

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

“ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE”



La urba hotelo de Södertälje

kie dum la Pentekosto 1934 okazos la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio.

N:r 4.
N-o 4.

April 1934.
Aprilo 1934.

Pris 25 öre.
Prezo 25 oeroj.

SVENSKA
ESPERANTO-TIDNINGEN
LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.
Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.
Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.
Lösnummer 025.

Annonspris: 15 öre pr mm.
Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.
Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.
La administracio: Box 698, Stockholm.
Anonco pri korespondado kostas
2 respondkuponojn.
Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet
(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.
Sekretariatets adress: Fredsgatan 4.
Postgirokonto N:r 2012.
Arsavgift för direkt anslutna medlem-
mar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften
för Svenska Esperanto-Tidningen.
Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.
Telefon: Huddinge 279.
Skr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgs-
gat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.
Postgiro 515 11.
Avd. för examens- och språkfrågor: Rek-
tor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villa-
stad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik,
kurser: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund
(Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15,
Göteborg.
Skr.: Gustav Rimberth, Kommendörs-
gatan 41, Göteborg.
Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johans-
gatan 61, Göteborg.
Arsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

- Systematisk kurs i Esperanto.* Av
Seppik-Malmgren. En enkel och
lätt lärobok för nybörjare... 0:75
- Esperanto utan förkunskaper.* Av
Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50
- Övningsbok till d:o.* 0:50
- Praktisk lärobok i Esperanto* för
kurser och självstudium. Rik på
förklarande exempel. 2:—
- Kurs i Esperanto.* Del I. Av Fritz
Lindén. Synnerligen enkel. . . 0:90
- D:o.* Del II. Läsebok. 0:90
- Lärobok i Esperanto* för A.B.F. och
andra studiecirklar. Av Jan Mas-
siak. Inb. 2:50
- Kommentarer till d:o.* 1:—
- Esperanto-Kurso.* Av V. Setälä. En
enkelt och trevligt läsebok. III. 0:50
- Esperanto-Grammatik.* Av Lärov-
adj. Nils Nordlund. 1:50
- Nyckel till Esperanto.* Miniaturläro-
bok med ordlista. 0:10
- Dubbel Fickordbok i Esperanto.* Av
Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk
o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50
- Esperantisk-svensk Ordbok.* Av P.
Nylén. 232 sid. Häft. 3:75
- D:o, inb. i hållbart klotb.* 5:—
- Svensk-Esperantisk Ordbok.* Av G.
H. Backman. För tillf. slutsåld.
- Esperanto-Ordbok.* Av N. Nordlund.
1:—
- Prepositionerna i Esperanto.* Av N.
Nordlund. 0:75
- Fundamenta Krestomatio.* Av D:r L.
L. Zamenhof. Läsestycken avsedda
att utgöra mönster för god espe-
rantostil. 3:25
- Dialogoj en Esperanto.* Por kursoj
kaj grupaj kunvenoj. Av Einar
Dahl. 32 sid. 0:50


Förlagsföreningen Esperanto n. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.
Tel. 31 65 01.
Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.
Order överst. 10 kr. försänd. portofritt.
Vid ins. av förskottslikvid för mindre
order bif. 10 proc. till portokostnader.
Fullständig prislista på begäran gratis
och franko.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



La banejo
de
Södertälje.

Södertälje —

*la urbo de la jarkunveno
de Sv. Esperanto-Federacio.*

. Södertälje estas unu el la plej malnovaj urboj de Svedujo. Ĝi ekzistis jam en frua mezepoko; oni ne certe konas la daton de ĝia fondiĝo. En la granda norda milito, post la morto de Karlo XII, trafis la urbon terura katastrofo, la rusoj forbruligis la urbon kaj indulgis nur la preĝejon.

La evoluon de la urbo forte akcelis la konstruado de kanalo inter Melaren kaj Balta Maro en la komenco de la pasinta jarcento. En la jaroj post la mondmilito oni pligrandigis kaj la kanalon kaj la

kluzon tiom, ke ili ebligas al grandaj ŝipoj traveturi.

La moderna Södertälje estas industria urbo: grandskale estas fabrikataj ŝarg-aŭtomobiloj, omnibusoj, separatoroj, cigaredoj, kuraciloj ktp.

Vidindaĵoj estas la preĝejo el la XIIa jarcento. Muzeo de Norda Södermanland kaj la kluzo. Menciinda estas ankaŭ la bela Popolparko, kiu somere estas multnombre vizitata.

La urbo ankaŭ estas fama kiel banloko kaj restadejo de resaniĝantoj pro bela situo kaj ozonriĉa aero. Moderna akvokuracejo liveras ĉiuspecajn banojn. Proksime de la urbo troviĝas ĉe golfo de Balta Maro la belega somerbanejo, »Havsbadet», kie sin banas samtempe miloj da homoj. El la proksima ĉefurbo kaj la ĉirkaŭaĵoj alvenas ekstravaganaroj, plenaj de homoj, kiuj emas malvarmetigi siajn korpojn en la sala akvo kaj poste sunbrunigi sin ripozante sur la sabla strando.

Årsmötet

och dess program.

Under pingsthelgen samlas åter vårt förbunds medlemmar till årsmöte. Och denna gång är det Södertälje, som inbjudit. Som denna plats ligger förhållandevis centralt och med mycket bekväma tågförbindelser såväl norr- som söderut, hoppas såväl förbundsstyrelsen som den anordnande staden på god tillslutning av förbundets medlemmar. Våra klubbar böra söka sända representanter till mötet, och i övrigt äro förbundets samtliga medlemmar välkomna till årets generalmönstring före världskongressen.

Mötesbyrån är öppen pingstaftonen från 5 e.m. och under pingstdagen från 9,30 f.m. i Södertälje stadshotell, där samtliga förhandlingar hållas.

PINGSTAFTON 19 MAJ:

Kl. 3 e.m. Svenska Lärares Esperantoförbunds årsmöte.

Kl. 6 e.m. SEF:s styrelse sammanträder.

Kl. 7 e.m. SEF:s årsmöte öppnas enligt följande program:

1. Tal av SEF:s ordförande.
2. Val av årsmötets funktionärer.
3. Korta hälsningar av föreningsombuden.
4. Gemensam supé.
5. Underhållningsprogram.
6. Dans.

Pri la esperantista movado de Södertälje oni povas diri, ke ĝi ne estas tiom nova, kiom multaj kredas. Jam antaŭ tridek tri jaroj ekzistis ĉi tie grupo, kiu kalkulis pli ol 150 membrojn. Energia kaj talenta pioniro estis J. J. Süßmuth, juna jutlaboristo el Moravio, nun unu el la plej eminentaj gvidantoj de la esperantomovado en Usono. Post lia forveturo iom post iom malplifortiĝis la movado, kaj dum multaj jaroj restis nur kelkaj izoluloj. La nuna esp.-movado datiĝas de 1930, kiam revigliĝis »Progresado», Societo Esperantista de Södertälje. La kampo estas malmola, sed ni kredas kaj esperas, ke ankaŭ ĉi tie fine la verda stelo venkos. Ni tre ĝojus, se vi, karaj gesamideanoj, multnombre vizitos nin dum la jarkunveno. La esperantistaro de Södertälje kore bonvensalutas la jarkunvenon kaj ĝojas pro la renkontiĝo pentekoste.

Abio.

PINGSTDAGEN 20 MAJ:

Kl. 10 f.m. Årsmötets förhandlingar fortsättas, varvid behandlas förbundsstyrelsens årsberättelse och revisionsberättelsen, förbundets propaganda och arbetsuppgifter. I. ö. ärenden enligt stadgarna.

Kl. 2 e.m. Lunchrast.

Kl. 3,30 e.m. Fortsatta förhandlingar.

ANNANDAG PINGST 21 MAJ:

Kl. 10 f.m. Förlagsföreningen Esperantos u.p.a. årsstämma.

Kl. 12 middag: Svenska Esperanto-Institutets diskussionssammanträde rörande undervisning, examina o.s.v. (Esperanto-examina kunna avläggas under årsmötet. Med rektor Sam Jansson, Skogen 23, Lidingö, bör skriftlig överenskommelse träffas i förväg om tid o.s.v.)

Den i föregående nummer av vår tidning medsända blanketten för anmälan till årsmötet och rumsbeställning bör snarast och i varje fall senast den 10 maj insändas till herr N. Colding, Elverket, Södertälje.



S. E. F:s matrikel

är under tryckning. Nya medlemmar och klubbar tillhörande S.E.F., som omedelbart insända namnuppgifter och adresser, kunna ännu beredas plats i matrikeln.

Matrikeln, som gratis kommer att tillställas förbundets samtliga medlemmar i slutet av april, innehåller förutom medlemmarnas namn och adresser även förbundets styrelse- och revisionsberättelser samt en synnerligen värdefull redogörelse över Esperantoundervisning i olika europeiska länders skolor.

»QUO VADIS» på esperanto.

Den världsberömda romanen »Quo Vadis?» av den polske författaren och nobelpristagaren Henrik Sienkiewics har just utkommit i esperantoöversättning. Översättare är Lidja Zamenhof, och utgivare är »Populära Esperantobiblioteko» i Amsterdam.

La financa skandalo en Francujo
Gazetleganto: »Kion do faris Stavisky?»
Alia gazetleganto: »Mi ne bone komprenas tion. Ĉio, kion mi scias, estas, ke li »Kreuger-is.»

Por Stockholm — voĉo eleksterlanda.

La XXVI-a Universala Esperanto-Kongreso okazos ĉi-jare dum la 4—11 de aŭgusto en Stockholm, la t. n. »Norda Venecio». La situon de Stockholm oni komparas al tiu de Konstantinopol kaj la enveturo flanke de Baltika maro egalas la enveturon trans la rivero al Sidney kaj diversaj japanaj riveroj. La ĉefurbon loĝigantan 500.000 homojn la svedoj nomas »Melara Reĝino», sed tiu flata nomo ne tute estas prava, ĉar Stockholm estas ankaŭ reĝino de Baltika maro, ĉar ĝi kuŝas sur la insuloj kaj duoninsuloj de la Melar-lago kaj ĝia enfluo en la Baltika maro. Ĉirkaŭ tiu ĉi enfluo situas la urbocentro, inda atenton de la vizitanto.

La enveturo al Stockholm flanke de la maro daŭras kelkajn horojn kaj estas inda admiron kaj laŭdon. Unu el la plej grandaj allogoj de Stockholm, krom la urbocentro, situata ĉirkaŭ la reĝa palaco estas ĝia belega ĉirkaŭaĵo.

Nur nemultaj grandaj urboj tiel senpere trairas de dense konstruitaj stratoj al libera spaco al variigita naturo, lagoj montoj kaj arbaroj kovrantaj la teron kaj insulojn. Ĉarme aspektas tia naturvarieco precipe dum la somernoktoj por homo impresigema je naturbeleco. Kiam la noktoj fariĝas mallongaj la urbo speguligante per siaj lumoj en la akvo, disvastiĝas ĉarman aspekton. Ne mankas krome en la ĉefurbo muzeoj, bildogalerioj, monumentoj kaj ĉarmaj lokoj por ekskursoj; ne mankas, cetere, luksaj hoteloj, restoracioj kaj kafejoj. La stokholmanoj kaj entute la svedoj inklinas al komforto.

Stockholm estas la plej granda sveda import-haveno kaj Göteborg okupas ĉefan lokon de eksport-haveno.

Stockholm estas ankaŭ grava industria centro kaj havas multajn industriajn entreprenojn tiel en la urbo mem, kiel ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo. La ĉefurbo de Svedujo, priskribita de diversaj poetoj, en kiu ĉiu alilandano estas kvazaŭ hejme, en la urbo de laboro kaj samtempe senzorga amuzo, en urbo de historio kaj moderna vivo, kunvenos ĉi jare adeptoj de la Verda Stelo el proksimaj kaj malproksimaj lokoj sur la tero, kaj partoprenos en la granda solenaĵo manifestante siajn sentojn por la genia kreinto de la lingvo Esperanto, la Majstro Zamenhof.

Kiu ĉeestis Esperantan Kongreson kaj vidis la kunvenintajn centojn da delegitoj de 50—60 nacioj, kiu partoprenis la kongresaranĝojn kaj imponajn manifestaciojn de la diverslanda esperantistaro kiu povas esti fiera pri siaj ĝisnunaj atingoj, kaj tiuj kiuj volas ĝui estadon en Svedujo — belega turisma loko, tiu devas veturi al la Universala Esperanto-Kongreso en Stockholm, ĉar veturo kaj vizito de Svedujo donas al la vizitanto multajn impresojn, kaj agrablajn travivaĵojn; la Kongreso mem estas tre interesa aranĝo diversmaniere variigita, kaj ĉiam estas impona kaj briĉa.

Denove dum la XXVI-a Universala Esperanto-Kongreso ni konvinkigos ĉiujn pri la viveco kaj brila estanteco de Esperanto por la homaro. Esperanto estas nobla ideo de paca kunvivo de ĉiuj nacioj, sublimes celado al unuigo de la homaro. Esperanto malfermas al ni la tutan mondon ĉar ĝiaj adeptoj troviĝas ĉie. Pro la proksimeco al Polujo certe multaj polaj samideanoj ĝin partoprenos kaj ekkonos la belan Svedujon, en kiu ĉiu provinco havas siajn karakterizajn ecojn, ĉirkaŭaĵon, arkitekturon, naciajn vestojn, kaj eĉ malsamajn morojn.

Dum la XXVI-a Universala Esperanto-Kongreso en Stockholm ni ekkonos la ĉarman kulturan Svedujon, kaj samtempe la popolojn de preskaŭ la tuta mondo.

Oskar Berman (Warszawa).



Allt flera klubbar

ansluta sig till Svenska Esperanto-Förbundet. Sedan vår föregående rapport ha ytterligare en del klubbar beslutat anslutning.

Vi hälsa klubbarna välkomna till förbundet och hoppas på bästa samarbete! Ännu torde emellertid i vårt land finnas en hel del nya klubbar och studiecirklar, som äro alldeles fristående. Esperantörörelsen erhåller verkligt stöd av dessa klubbar först då de anslutit sig till ett förbund. Å andra sidan ger Svenska Esperanto-Förbundet sina klubbar sådana förmåner, att varje esperantist har verklig fördel av sitt medlemskap. Tillskriv oss!

S-ro Sinha

Ĵus hejmenvenis el Norvegio, kie li dum unu monato prelegis en la tuta lando, de sudo ĝis nordo. Entute 20 lokoj. Granda partopreno kaj, kompreneble, same granda sukceso.



Jam 1100 kongresanoj.

Kongresaranĝoj.

1. Kiam finiĝis la limtempo de aliĝo al la kongreso por favorkotizo, t. e. 31 marto, ne malpli ol ĉ. 1.100 personoj aliĝis al la kongreso. Ĉiuj kompetentuloj substrekas, ke estas eksterordinare alta cifero. Oni antaŭvidas brilan kongreson!
2. En la honoran komitaton jam estas elektitaj princo Carl (la prezidanto de internacia Ruĝa Kruco), Selma Lagerlöf, urbestro Carl Lindhagen.
3. La urbo Stockholm decidis oficiale akcepti la kongreson per honora lunĉo en la Urba domo de 6-an de aŭgusto.
4. En la fino de aprilo estas dissendotaj mendiloj pri loĝo kaj postkongresaj ekskursoj.
5. Svedoj, kiuj jam ne aliĝis al la kongreso, ankaŭ estonte havos la rajton fari per du partpagoj. De nun la unua partpago estos 15 kr., kaj la dua partpago (devas esti ensendita antaŭ 1 julio) por ĉiuj 10 kr.
6. Svedoj ensendu la kotizon per nia poŝtgirokonto 50443, eksterlandanoj al nia konto ĉe la banko: Sundsvalls Enskilda Bank, Fredsgatan 4, Stockholm.

Antaŭkongreso en Malmö.

Survoje al Stockholm haltu en Malmö, tria sveda grandurbo, la sojlo de Skandinavio kaj bela someroĉarma metropolo de la fruktoporta suda provinco Skanio, apud ridetantaj ondoj de la mirinda Öresund.

La Klubo Esperantista de Malmö kore invitas vin, gefratoj tutmondaj, survoje al la verda semajno en Stockholm. La Antaŭ-Kongreso, kiun aprobas kaj sub-

tenas la XXVIA Universala Kongreso en Stockholm, okazos en la bela urbodomo kaj alogas per programo kontentigonta eĉ la plej kritikemajn postulantojn. La kongresa komitato penados fari ĉion por via bonfarto kaj la tuta kongresurbo montros al vi koran simpatian. Bonvolu sekvi pri tio niajn komunikojn en la esperantaj ĵurnaloj!

Pro samtempa okazo de la Skania Foiro en Malmö oni estas petata plej eble frue aliĝi kaj mendi loĝejon. Tiam la kongresa komitato ekspedas nur al tiuj, kiuj aliĝas kaj samtempe pagas la kotizon Sv. Kr. 5:— . Lasta dato de aliĝo la 1an de julio 1934.

Laŭ interkonsento kun la direkcio de la Svedaj Ŝtataj Fervojoj ni aranĝas kune kun la Esperanta Turista Komisiono **SPECIALAN KONGRESVAGONARON** inter Malmö kaj Stockholm. Ĉar en la nomita treege rabatita vojaĝo rajtas partopreni nur la anoj de la diversaj naciaj kongreskaravanoj kaj tiuj svedoj, kiuj komencas la veturon en Malmö, estas tre rekomendinde aliĝi al la koncernaj grupoj. Svedoj petu specialan cirkuleron por anonco al la sveda grupo!

Adreso nur: »ESPERANTOKONGRESO 1934«, Malmö, (Svedlando).

271 ĝis 400.

El la ĝis nun anonciĝintaj 1.100 kongresanoj ni ĉi tiun fojon represas la jenajn — (Ĉiu kongresano ricevos je la alveno al la kongresurbo inter la dokumentoj ankaŭ kompletan liston de la personoj, kiuj aliĝis al la kongreso):

271. Marta Moelke, Hünensteig 8a, Berlin-Steglitz, Germanujo.
272. Ingegerd Sandberg, instruistino, Rutgers Fuchsgatan 4, Stockholm.
273. Thure Sääv, fervojisto, S. J., Tomtebodan, Stockholm, Svedujo.
274. K. Karlsson, Lågtomt, Årsta, Upsala, Svedujo.
275. Elsa Edenby, Gävle 2, Svedujo.
276. Sven Edenby, " " "
277. Samuel Hawthorne, organizisto, Buccleuch Street 12, Glasgow C. 3, Skotlando.
278. John Curtin, instruisto, Grovepark Place 7, Glasgow N. W., Skotlando.
279. Rafel Israëls, instruisto, »Nia Hejmo«, 2e Exloërmond, Drente, Nederlando.

280. Valter Johansson, Höjen, Håle, Sju-berga, Svedujo.
281. Sven Berg, metallaboristo, Vallgatan 34, Karlskrona, Svedujo.
282. A. Malmanche, farmaciisto, Paul Doumer 101, Rueil-Malmaison, Seine-et Oise, Francujo.
283. Charles Johansson, Pålstorp, Norrköping, Svedujo.
284. Ester Henning, instruistino, Prästgatan 66, Norrköping, Svedujo.
285. Sven Friberg, hejtisto, Ramnalid, Borås, Svedujo.
286. Stina Fränberg, instruistino, Klinga, Svedujo.
287. Ester Wärnström, instruistino, S. Promenaden 13, Norrköping, Svedujo.
288. Attilio Clavenna, Gall. Vitt. Emanuele 92, Milano, Italujo.
289. Ramiro Turi, doktoro, Via Silvio Spaventa 51, Napoli, Italujo.
290. Arrigo Bajetti, pastro, Via Benacense 13, Brescia, Italujo.
291. Elly Holldin, tekstillaboristino, Storgatan 15, Strömsbro, Svedujo.
292. Artur Andersson, tramisto, Värnhemstorget 7, Malmö, Svedujo.
293. Harry Nilsson, komercisto, Ehrensvärdsgatan 20, Malmö, Svedujo.
294. Siegmund Freund, komercisto, Karlstrasse 21, Breslau, Germanujo.
295. Anna Malmkvist, Drömsstigen 14, Äppelviken, Svedujo.
296. Britta Malmkvist, " " "
297. Edith Tomsen, oficistino, Narva 50—4, Tallinn, Estonio.
298. Herta Viidas, instruistino, S. Pärnu mnt. 84, Nõmme, Estonio.
299. Erika Viidas, instruistino, S. Pärnu mnt 84, Nõmme, Estonio.
300. Julia Riisberg, oficistino, Tulbi 10—7, Tallinn, Estonio.
301. Herman Saalfeld, komercisto, Breiter-Weg 6, Magdeburg, Germanujo.
302. Lotte Saalfeld, Breiter-Weg 6, Magdeburg, Germanujo.
303. Nils Johansson, vendejservisto, Karlsro 16 A, Norrköping, Svedujo.
304. Karin Lindberg, Prässebo, Svedujo.
305. Torsten Lindberg, instruisto, Prässebo, Svedujo.
306. Catherine Pannevin, eksinstruistino, Rue Flahaut 15, Boulogne-sur-mer, Francujo.
307. Otto Nilsson, kontoristo, Hantverkaregatan 12, Malmö, Svedujo.
308. Greta Nilsson, Hantverkaregatan 12, Malmö, Svedujo.
309. Sofia Lindberg, kontoristino, Gemla, Svedujo.
310. Helga Österlund, Bergsgatan 6, Eskilstuna, Svedujo.
311. Harald Grønberg, instruisto, Katt-rup skole, Hasselager, Danujo.
312. Albin Soneson, instruisto, Strömsnäsbruk, Svedujo.
313. Klara Waldén, instruistino, Sturegatan 10, Ystad, Svedujo.
314. Hulda Stenberg, instruistino, Tullgatan 1, Ystad, Svedujo.
315. Holger Svensson, fabriklaboristo, Lejonbacken 423, Ljusne, Svedujo.
316. K. Johnson, Akademiska sjukhuset, Upsala, Svedujo.
317. Oskar Svantesson, instruisto, Karl Johansgatan 61, Göteborg, Svedujo.
318. Signe Grundberg, instruistino, Elds-mark, Husum, Svedujo.
319. Bjarne Beckman, lektoro, Konstapels-gatan 19, Karlskrona, Svedujo.
320. Gustaf Fors, komercisto, Gnarp, Svedujo.
321. Katharina Klingsporn, oficistino, Strelitzer 44, Berlin N 31, Germanujo.
322. Ada Bengtsson, flegistino, S:t Lars sjukhus, Lund, Svedujo.
323. P. Couffinhal, Lacépède par Colayrac, Lot et Garonne, Francujo.
324. Karl Gustafsson, komercisto, Box 1, Bergvik, Svedujo.
325. F. C. Clewlow, ŝtatoficisto, »Downside», Queslett Road, Great Barr, Birmingham, Anglujo.
326. Clara Bruér, oficistino, Mariedalsvägen 17 a, Malmö, Svedujo.
327. Alice Holt, Fairfield avenue 45, Waterfoot Nr, Manchester, Anglujo.
328. Sven Segelson, instruisto, Kyrkskolan, Rådmansö, Svedujo.
329. Astrid Enzél, instruistino, " "
330. Helge Beckman, Åsbergsgatan 10, Visby, Svedujo.
331. Greta Berggren, Alfta, Svedujo.
332. Gottfried Fjelke, rektoro, Gyttjom, Tierp, Svedujo.
333. Alfred Rivier, eksgeneralinspektoro de la laboro, Rue Broussais 6, Alger, Alĝerujo.
334. Erland Nilsson, laboristo, Box 61, Iggesund, Svedujo.
335. Aug. Danielsson, lignajisto, Långbro sjukhus, Älvsjö, Svedujo.
336. A. M. Fohren, instruistino, Dunanstraat 24 A, Rotterdam, Nederlando.
337. J. B. Seckel, instruistino, Poulinckstraat 60, Almelo, Nederlando.

338. Truus Zonnevjlle, Korreweg 101-A, Groningen, Nederlando.
339. W. Balfort, Parklaan 9, Groningen, Nederlando.
340. M. Jacob Albert, Esperanta Dometo, B:d Dessaise, Thonon les Bains, Francujo.
341. A. Siitam, studento, Paldiski mnt 37—9, Tallinn, Estonio.
342. Anna Åström, kontoristino, Rebet-skygatan 14, Sundsvall, Svedujo.
343. Arthur Wallin, sekretario, Smed-slättsvägen 43, Äppelviken, Svedujo.
344. József Pończa, ekonomo, Ropice 64, C, Tesin, Ĉeĥoslovakujo.
345. Sabine Luther, stenotipistino, Glogauerstr. 8, Breslau, Germanujo.
346. Vera Andersson, Hoxeröd, Uddevalla, Svedujo.
347. Karin Andersson, Hoxeröd 1, Uddevalla, Svedujo.
348. Greta Hansson, Samnerödsvägen 25, Uddevalla, Svedujo.
349. Margareta Mattsson, Kungsgatan 11, Uddevalla, Svedujo.
350. Lili Mattsson, Kungsgatan 11, Uddevalla, Svedujo.
351. Teo Jung, redaktoro, Brüsseler str. 94, Köln, Germanujo.
352. Rasmus Christenson, muelisto, Edslev, Hørning, Danujo.
353. Søren Hansen, pentristo, Kolt, Hasselager, Danujo.
354. Marja Lencznar, Konopnickiej 13, Lancut, Polujo.
355. Hjalmar Petterson, librotenisto, Parkgatan 22, Boden, Svedujo.
356. Hjalmar Leyden, instruisto, Höör, Svedujo.
357. Johannes May, poŝtejestro, Postamt, Saarlouis, Saarteritorio.
358. Maria May, Postamt, Saarlouis, Saarteritorio.
359. »Coko».
360. »Eso».
361. Magda Carlsson, instruistino, Säffle, Svedujo.
362. Fritiof Tengbert, fervojisto, Borgaregatan 17, Göteborg, Svedujo.
363. Gösta Åström, Mellersta skolan, Gävle 2, Svedujo.
364. K. L. Nilson, tipografo, Ehrensvärdsgatan 5, Karlskrona, Svedujo.
365. Evy Nilsson, Ehrensvärdsgatan 5, Karlskrona, Svedujo.
366. Iris Nilsson, " " "
367. Ernst Eriksson, Järnbrogatan 5, Upsala, Svedujo.
368. Herman Fredriksson, Generalsgatan 21, Norrköping, Svedujo.
369. Maria Persson, komercistino, Bergsgatan 11, Malmö, Svedujo.
370. Josef Pihlström, librotenisto, Södra Promenaden 19, Norrköping, Svedujo.
371. Ed. Speilmann, direktoro de svisa Esp. Inst., Gesellschaftsstrasse 39, Bern, Svisujo.
372. Madame Lacroix, instruistino, Rue de Courtrai 223, Gand, Belgujo.
373. Vittoria Segré, Corso Torino 53/10, Genova, Italujo.
374. Alfred Söderström, flegisto, Andersro 28, Tumba, Svedujo.
375. Thor Afzelius, eksbankdirektoro, Pilen Södra 1, Lidingö 1, Svedujo.
376. Ester Blom, kudristino, Bävedalen 7, Uddevalla, Svedujo.
377. V. Em. Sandmark, pastro, Södra Strandgatan 13, Jönköping, Svedujo.
378. W. E. Clayton, 29 Clapham Mansions, Nightingale Lane, London S. W. 4, Anglujo.
379. A. M. Clayton, " " "
380. G. M. Hayton, Oughterside, Platt, Boro Green, Kent, Anglujo.
381. A. B. Holness, Crescent Road 124, New Barnet, Herts, Anglujo.
382. Lewis Mason, Brookville Road, Glenfields, Leicester, Anglujo.
383. Gustav Ottander, Östervåla, Svedujo.
384. Liv Sandberg, Box 197, Bekkelaget, (Oslo), Norvegujo.
385. Herbert Reed, Nevell's Road 200, Letchworth, Anglujo.
386. Violet Reed, " " "
387. Sybil Reed, " " "
388. Tore Hallerström komercisto, Billsbro, Vingåker, Svedujo.
389. Maja Ahlström, Koopmansgatan 4, Göteborg, Svedujo.
390. Rudolf Österlind, instruisto, Jämjöslätt, Svedujo.
391. Rose Szilágyi, Ssondy-u. 19, Budapest, Hungario.
392. Karl Gustafsson, ekspolicisto, Skånegatan 66, Stockholm, Svedujo.
393. Astrid Lundkvist, Hannelund, Tunafors, Eskilstuna, Svedujo.
394. Margarete Kubillus, korespondantino, Hinter Tragheim 64, Königsberg, Germanujo.
395. Henry Guyon, ŝtatoficisto, Rue du Maréchal oudinot 141, Nancy, Francujo.
396. Julie Singer, Nassengrub 53, Asch II, Böhmen, Ĉeĥoslovakujo.

Esperanto servas.

Ciu esperantisto certe iam spertis ke li havas grandajn eblecojn per la lingvo kaj se li havas volon kaj intereson li certe ofte havas okazon montri al la ne-esperantistaro ke li tre facile povas al ili servi, rilate eksterlandajn aferojn.

Antaŭ kelka tempo venis en la butikon kie mi laboras maljuna virino, kiu kun larmoj en la okuloj montris al mi karton, kiun ŝi akceptis el Francujo kaj laŭ la angleskribita enhavo ŝi komprenis ke ĝi temis pri ŝia filo kiu estas maristo kaj laŭ stampo en la angulo ŝi konstatis ke ĝi venis el malsanulejo en Marseille. Ŝi aŭdis ke mi scipovas Esperanton kaj do petis min legi la enhavon. Per la helpo de anglescipovanta amiko mi tradukis la tekston. La malsanuleja kuracisto skribis ke la filo estis grave malsana, sed esperis ke li baldaŭ povos sendi pli bonajn informojn. La patrino kompreneble tre malĝojis kaj ŝi senespere ploris, sed mi trankviligis ŝin dirante ke mi povos skribi al esperantisto en Marseille por ricevi detalajn informojn pri la filo.

En la jarlibro de U.E.A. mi trovis la nomon de tiea delegito s-ro Profesoro H. Bourdelon kaj al li mi sendis leteron petante la servon.

Post kelkaj tagoj mi ricevis karton per kiu li informis ke li kune kun sia edzino vizitis la malsanulon kaj kun li (kun granda malfacileco) interŝanĝis kelkajn vortojn en angla lingvo. La kuracisto rakontis ke la maristo ĉe la alveno en Marsejlon estis tre grave malsana, li sputis sangon el la pulmoj, sed nun dank' al zorga flegado estis multe

397. Hjalmar Kihlberg, Vingåker, Svedujo.
 398. Elizabeth O'Brien, Bouverie Road 10, Stoke Newington, London N 16, Anglujo.
 399. Susan G. O'Brien, Navarino Road 50, Worthing, Sussex, Anglujo.
 400. Carl Jonsson, Kalix, Svedujo.

Laŭlande: Alĝerujo 2, Anglujo 30, Belgujo 6, Ĉeĥoslovakio 5, Danujo 7, Danzig 1, Estonio 26, Finnlando 2, Francujo 21, Germanujo 42, Hindujo 1, Hispanujo 1, Hungarujo 1, Italujo 12, Latvio 2, Nederlando 47, Norvegio 13, Polujo 1, Saar-teritorio 4, Skotlando 9, Svedujo 167, Svisujo 1 = 400.

SVEDA KRONIKO

ALVESTA. S-ino E. Seppik ĉi-tie gvidis esperantokurson, kiu finiĝis per ĝoja festo kun ekzameno, paroloj, teatraĵo k.t.p. La rezulto de la kurso estas mirinda, konstatas la Alvesta-esperantistoj.

ARBOGA. Jarkunveno 14.1. La nova estraro: Hjalmar Andersson, prez.; Carl Erik Bergström, sekr.; Gustaf Berggren, kas. S-ro Stuit el Holando parolis pri spertoj en Esperantujo. — Nun funkcias tri komencaj kursoj: en Säterbo, Valskog kaj Skogsborg. *B-n.*

BILLESOLM. Esperantoklubo de Billesholmo jarkunvenis 23.2. Estraro por 1934 estas: Per Andersson, prez.; Folke Andersson, vicprez.; John Nilsson, sekr.; Nils Welander, kas.; John Sjö Dahl, vicsekr. Dum la kunveno okazis vigla diskutado pri la neŭtraleco de Esperanto. Plie malgranda leciono de s-ro Folke Andersson pri la sufiksoj ig kaj iĝ. *La sekr.*

BÖKSHOLM. 11.2. lumbildparolado de lektoro H. Seppik pri »Estonio, la lando de svedaj memorajoj». Plena salono, pli ol 200 personoj. Interpretis lerte instr. Jacobsson el Växjö. Poste mallonga Cseh-metoda provleciono.

BROVALLEN. Studrondo esperanta de »Templet Venus av N.T.O.», gvidanto E. V. Ahlin, Bergshyttan. Ni kunlaboras kun esp. studrondo de A.B.F. en Krylbo, gvidata de germana instruisto Bernhardt Höffner. 18.3. estis komuna kunveno en Bergshyttan. Vespere publika kunveno kun koncerto kaj prelego de Höffner pri »Impresoj dum vojaĝoj tra kvin Eŭropaj landoj». Tradukis sveden E. V. Ahlin. *V. A.*

ENSKEDE. Nova klubo ĉi tie aliĝinta al SEF. Prez. estas Eric Severin, sekr.

pli bona kaj sen danĝero, kaj post 15 tagoj povos foriri en Svedlandon.

La virino kaj ŝia edzo fariĝis tre dankemaj pro la helpo kaj ili tre admiris Esperanton dirante ke ili persvadu sian filon lerni la lingvon kiam li hejmenvenos.

*Gunnar Fredin,
Gunnarstorp.*

Sune Kjellander, kas. Erik Persson. — 20.2. Propaganda kunveno okazis en Enskede popola lernejo. Paroladis d-ro Szilágyi kaj s-ro Sinha. *S.K.*

ESKILSTUNA. 18.1. Post prelego kaj bona provlecio de Ĉe-instruisto S. Stuit. Hollando, komencis nova kurso kun 28 komencantoj. Gvidanto: Anders Hertzman.

13.2. Jarkunveno. Elektita estraro: Anders Hertzman, prez.; Henry Gustavsson, v. prez.; Sven Gustavsson, sekr.; Helga Österlund, v. sekr.; Karin Flodkvist, kas. Studgvidanto: Arvid Ågren.

GRIMSLÖV. Lumbildparolado de H. Seppik pri Estonio la 18.2. en la popola altlernejo. Plena salono, inter ili la rektoro kaj geinstruistoj de la lernejo. La rektoro bonvenigis kaj s-ano Jacobsson el Växjö bonege tradukis. Precipe la geinstruistoj kaj gelernantoj tre interesitaj pri Esperanto. Post la prelego intima kunestado kun la rektoro kaj geinstruistoj.

GUDMUNDRA. 30.3. Kunveno en Östbydal por la geesperantistoj de la komunumo, aranĝita de la esperantogrupo de la loka NOV (Absolutista Ordeno Verdand)



La Esperanto-kurso de Morariu en Borås.

24.2: En la malnovstila gastejo Pilkrog sukcesplena jarfesto kun vespermanĝo. S. Stuit faris belegan paroladon. »La verduloj» kantis speciale verkitan kanton. Ankaŭ la kantistaro de s-ro Niekerke kantis.

27.2: Kunveno kun Esp. kroniko Muziko per gramofono: »Trinkanta Samidano» kaj elparolado de Edmond Privat. *Sekr.*

FALUN. Rektoro Sam Jansson, Stockholm, prelegis 1.3. en Falun, invitita de Prelega Societo de Falun pri »Solvo de la mondlingva demando.» Poste Klubo Esperantista havis specialan kunvenon, ĉe kiu la rektoro parolis pri la 26-a. *H. J.*

GEMLA. 11.2. Cseh-metoda provlecio de s-ino Erika Seppik. Helpis s-ano Einar Karlsson el Växjö. Kurso preparata.

di). Parolado kun lumbildoj de Tibor Czitrom kaj poste provlecio. Oni fondis »Amika rondo». Prez. Bror Bergman, Frånö. *Lenko.*

GÄLLIVARE. 22.2. Gällivare esperantista klubo jarkunvenis kaj elektis sekvantan estraron: Conrad Ryd, prez.; Ragnar Eriksson, kas.; Henry Fabricius, sekr.; V. Ahnberg, vicprez.; Gösta Berglund, vicsekr. — Dum la vintro la klubo kun helpo de ABF aranĝis kurson por komencantoj kun 16 partoprenantoj. Gvidanto Gideon Hallin el Malmberget, kiu instruas laŭ Cseh-metoda sistemo.

La sekr.

GÖTEBORG. 29.3. okazis printempa festo ĉe »ABF:s Esperantoklubb». Lekt. Seppik donis skizon pri la fantazia lingvoprojekto Volapük. S-ino Seppik kontribuis per humoraĵoj.

GÖTEBORG. La 3.3. red. T. Morariu parolis antaŭ la göteborgaj esperantistoj pri »Rumanujo, lando de petrolo kaj greno». Ĉeestis 150 personoj. Aranĝanto estis »ABF:s Esperantoklubb».

HALMSTAD. 18.2. la klubo jarkunvenis en pensiono, Vestkusten. Estraro por 1934: prez. Gunnar Lindh; kas. John Johansson; sekr. Alf Djuplin; kasistasis-tanto Erik Karlsson. Studgvidantoj estas J. M. Ahlström, Gunnar kaj Harry Lindh.

la plej fruaj esperantistoj de Svedujo) elektigis kiel honora membro. La klubo havas 16 membrojn. Fraŭlino Rönholm gvidas daŭrigan kurson. *La sekr.*

KARLSKRONA. La jarkunveno de Karlskrona Esperantoklubo okazis 27.1. Estraro estas: K. L. Nilsson, prez.; Sven Berg, vicprez.; C.-E. Svensson, sekr.; f-ino Ingeborg Pettersson, vicsekr.; Johan Svensson, kas. La klubo inter alie unuanime decidis forsendi proteston al Radioservo pro ĝia kontraŭemo kontraŭ



»Ercmonto» en Malmberget.

HÖGANÄS. Du komencantaj studrondoj, unu inter la socialdemokrataj virinoj, unu infana studrondo, unu progresaj kaj unu konversacia.

La 28.1. okazis la klubaj jarkunvenoj, kiam aliĝis ĉiuj ĝiaj anoj aŭ al SEF aŭ al SLEA laŭ la deziro. Kiel peranton por U.E.A. oni elektis Albin Johansson, kaj kiel peranton por SLEA Fritz Johanson. Estraro estas: Hugo Andersson, Ester Tuvesen, Rikard Andersson, F. Strand kaj F. Johanson. Por la biblioteko oni decidis aboni la gazetojn Svenska Esperanto-Tidningen kaj Svenska Arbetar-Esperantisten. La klubo decidis realiĝon al N. V. Skånes Esperantokrets. La klubo decidis sendi petskribon al Radiotjänst. *Albin.*

JÄTTENDAL. La esperanta klubo de Jättendal fondiĝis 22.2. Estraro por la klubo estas: instruisto Edvin Peterson, prez.; instruistino Wivi Rönholm, sekr.; instruistino Dagmar Sundström, kas. Subparoĥestro S. A. Lundström (unu el

Esperanto. Oni poste pasigis la vesperon per deklamado, legado, kantado k.t.p.

K. L. N.

KVITSLEBY. Njurunda Esperantosocieto »La Stelo» jarkunvenis. Estraro estas: Enoch Felldin, prez.; Torild Grönlund, vicprez.; Henrik Ranch, sekr.; Ragnar Vestrin, vicsekr.; Erik Dahlqvist, kas.; Olof Backman kaj Sven Olsson. »La Stelo» aliĝis al Sveda Esperanto-Federacio. Dum la printempo ni havas kunvenvesperojn ĉiujaŭde en la ejo de ABF en Kvitsleby. Du membroj gvidas komencanto-kursojn, unu en Gnarp kun 12 gelnantoj kaj unu en Stockvik kun 18 lernantoj. *Malfirmulo.*

LUND. 18.2. Lund'a Esperanto-Klubo havis jarkunvenon. Estraro: John Ek, prez.; Gunnar Knutsson, vicprez.; Ture A. Edberg, prot.-sekr.; Olle Olsson, koresp.-sekr.; Nils Weiland, kas.; Evert Persson, bibliotekisto. Dum la paŭzo kaj fine ĉe la danco bonege muzikis la trio Bröddén. *EILO.*

LIDKÖPING. 9.2. jarkunvenis Lidköpings Esperantoklubb. Je la jarfino la klubo havis 50 anojn. Kiel estraron por 1934 oni elektis: Halvard Carlbom, prez.; Georg Nilsson, kas.; Sven Palm, sekr.; Arvid Johansson, vicprez.; Erik Vallin, vicsekr. T.

LANGSELE: 11.3. Post la lasta instruohoro de Hans Fox la kursanoj fondis klubon kaj elektis kiel estraron: Sven Norén, prez.; Calle Näslund, vicprez.; Olle Sjögren, kas.; Valter Lindén, sekr.; Ragnhild Severin, vicsekr. La 12.3. la estraro decidis programon por la daŭriga laboro.

kaj pripensinda salutparolo de s-ro Emil Falk, kanto de s-ro L. Åberg, fine danco. Krome la klubo aranĝis vidindan ekspozicion, kiun oni nun, kune kun literaturo, intencas meti en iun elmontran fenestron en la urbo. Bona maniero vekti dormetantan intereson. *Homo sapiens.*

SOLLEFTEA: 9.3. Lasta instruvespero de la Csceh-metoda kurso. Gvidanto estis s-ro Hans Fox el Danzig. La partoprenintoj decidis ĉiusemajnan ekzercvesperon kaj promesis kune kun alia Esp.-studrondo baldaŭ fondi klubon.

SURTE. 30.3. la novfondita klubo »Sepino» por festeto invitis sian ŝatatan in-



La Skövde-esperantistoj en festa kunesto.

MALMBERGET. La esperanta klubo »La Ercmonto» 10.2. havis sian jarkunvenon. La nova estraro konsistas el: Gunnar Hanson, prez.; Saga Westin, sekr.; Gunnar Marklund, kas.; Gideon Hallin, v. prez.; Sonja Larsson, v. sekr. Sekvis tesupeo, dum kiu kelkaj klubanoj majstre prezentis la dialogon de Dahl »La mallerta violonisto». Nia najtingalo en la klubo bele kantis. Nova teatraĵo, »La stranga malsanulo», evidente amuzis la publikon. »La kuracisto».

RÖDEBY Esperantoförening jarkunvenis 9.2. Kiel estraro estis elektataj: prez. Fritiof Ahnfeldt; vicprez. Martin Holmesson; sekr. Nils Håkansson; vicsekr. Jan Petersson; kas. Frida Persson.

Prez.

SKÖVDE. Kunestadon aranĝis 24.2. la esperanta klubo de Skövde en la ejo de »Odd Fellow». Ĉirkaŭ cent Skövde-anoj partoprenis. La programo estis ne multampleksa sek bonkvalita: bonhumora

struistino, kies nomon portas la klubo. Partoprenis ankaŭ deko da göteborgaj samideanoj.

VISLANDA. Prelego la 18.2. de H. Seppik pri Estonio. Interpretis s-ano Jacobsson el Växjö.

VÄXJÖ. 13.2. ge-roj Seppik lumbildparolis pri sia hejmlando, precipe pri tiu tempo, kiam Estonio apartenis al Svedlando. S-ino Seppik vestita per sia belega nacia kostumo. Ĉeestis ĉiuj geïnstruistoj kaj la pli altaj klasoj. Tradukis instr. Jacobsson. La lernejestro dankis per varmaj vortoj por la interesa »geografia leciono».

ORREFORS. 2.3. prelegis s-ino kaj s-ro Seppik en Orrefors pri »Estlando en vortoj kaj bildoj». La prelego estis aranĝita de la loka I.O.G.T. Proksimume 100 personoj aŭskultadis la prelegojn, kiujn tradukis s-ro K. F. Lindqvist, Nybro. Post la parolado kolektiĝis la geesperantistoj

Malfeliĉo.



La novgeedzoj Martin Jansson.

S-ro Martin Jansson, la simpatia juna samideano en Stora Tuna, la vera animo de nia movado en Borlänge, promenanta la lastan de marto sur la landstrato kun sia estona edzino estis kun ŝi morte difektita de nesingarda aŭtomobilisto — ambaŭ geedzoj estis kripligitaj kaj sin trovas en grava danĝero inter morto kaj vivo. Ni tre bedaŭras.

de Orrefors, Flygsfors kaj Nybro en kafejo, kie oni kune kun ge-roj Seppik amuzis sin ĝis noktomezo.

La »aparato».

KOREKTIGO.

En n-ro 3 pri jarkunveno de Esperantounuiĝo de Örebro oni legas ke kasisto estas Gustav Andersson. Devas esti: Gustav Gustavsson. *Red.*



Kartoj kun svedaj provinckostumoj nun estas aĉeteblaj ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. La belaj multkoloraj presitaj kartoj surhavas esperantan tekston sur la adresflanko. Tiujn kartojn certe akceptos kun ĝojo viaj alilandaj gekorespondantoj. La prezo estas por kolekto de 10 diversaj kartoj sved. kr. 1:50.

Mortis Frans Schoofs.

Post mallonga malsano mortis nia belga samideano *Frans Schoofs* la 12-an de marto.

Li dum multaj jaroj estis sekretario-kasisto de Konstanta Rezentantaro, la ligo de la naciaj societoj. La unuan de januaro tiun ĉi jaron K. R. ĉesis funkcii laŭ la decido pri la novorganizo.

Frans Schoofs estis honorita per tre multaj Esperanto-oficoj. Li dediĉis al nia movado sindonan laboron. Lia praktika menso estis ofte grava trezoro dum niaj universalaj kongresoj, ĉe kiuj li ĉiam ludis gravan rolon.

La perdo de la Esperanto-movado estas eksterordinare granda pro lia morto. Ĉar li estis nur 46-jara, oni atendis ankoraŭ multon de li por la bono de Esperanto.

Fidela kunlaboranto, lerta gvidanto, praktika aranĝanto kaj amiko kun bona koro li estis.

La memoro de Frans Schoofs ĉiam restos viva inter la esperantistoj!

Ernfrid Malmgren.

La enterigo okazis la 15an de marto en ĉeesto de inter aliaj multaj esperanto-amikoj kaj reprezentantoj de diversaj esperantoorganizoj kaj je solena formo.

*

Inter la multaj nomoj de esperantistoj kiujn rikolits en la lastaj semajnoj la severa Morto ni ne forgesu la italan profesoron en Fano, Italujo, *Alessandro Mazzolini*, kiun speciale memoras la Isosek-anoj pro lia lerta kaj vigla gvidado pri lernado de nia lingvo. Li mortis la 16-an de jan. 73-jara. Mi estis sendinta al li longan leteron pri lingvaj demandoj, kiujn ni diskutis inter ni — antaŭ ĝia alveno mi ricevis la tragikan sciigon, ke lia vivo finiĝis! M. tre interesis sin pri lingvaj problemoj kaj eldonis diversajn lernolibrojn.

*

La 15-an de febr. mortis en Helsingfors Fil. doktoro *Nino Runeberg*, 60-jara. Li estis esperantisto de 30 jaroj, varbita en Parizo de prof. Cart, kie li tiam studis. Lia poeta pseŭdonimo Alceste estis tre ŝatata kaj kaŝis senteman, idealistan animon. *PNn.*

La reĝino de Saba.

Dan Andersson.

Iun nokton, kiam mi ne povis dormi kaj kolere kalkulis en ĉiu kvaronhoro la ululojn de la perlostrigo ekster la subtegmenta fenestro, la pordo malfermiĝis kaj paŝis en la ĉambron kaj ĵetis sin sur la randon de mia lito — reĝo Salomono kun grandaj botoj, leporfela veŝto, krudŝtofa pantalono, zono kun latunbutonoj kaj tenante sian ĉapon antaŭ min por almozpeti, almurmuris al mi tiun ĉi historion, kiun mi ja aŭdis dudekfoje:

— Mi estas la reĝo de la granda urbo Jerusalemo, kaj mi konstruis domon al sinjoro Cebaot sur la monto Moria kaj tuj apude mi konstruis unu al ĉiuj miaj virinoj, he, he. Ĉio estus en ordo, se la reĝino de Saba ne estus veninta tien, ĉu vi povas imagi, ŝi venis ĉiun nokton kaj malkaŝis al mi ĉiujn siajn pensojn kaj ŝi ne donis al mi bonorde manĝi, kiam mi venis hejmen, sed mi devis mem rosti la urogalojn, kiujn mi kaptis en la montaro Rikkika. Kaj ŝi sidis kaj vidis ĉian pompon, kiun Di-sinjoro donis al mi kaj ŝi ne volis aŭdi, kiam mi kantis: Kerapi Tapi, kaj ĉiujn donacojn, kiujn mi donis al ŝi, metis ŝi sur la ŝrankon kaj malica ŝi estis kiam mi diris, ke mi estas Salomono kaj ŝi la reĝino de Saba kaj mi batis ŝian vizaĝon, ke ĝi ekŝvelis, he, he, ĉar ŝi kuris ekstere kaj ne zorgis pri manĝaĵoj sur mia tablo kaj ŝi federaciis kun aliaj reĝoj, kio estis malbonaĵo antaŭ la vizaĝo de Dio kaj dum ok noktoj mi petis, ke la Sinjoro forigu ŝin kaj la reĝino federaciis ankaŭ kun la diablo kaj mi devas venki ŝin por ne mem esti venkata kaj tiam venis la dungosoldatoj de Jerobeam kaj mi sidis en kaptiteco kaj mi iĝis tia ĉi, he-he-he kaj ĉio pro la reĝino de Saba.

— Kaj foje mi batas mian kapon kaj mi ploras kaj ne scias, kiel mi povus liberiĝi de mia kapo, kiu estas tiom peza kaj varmega kaj foje mi iras for el la kastelo kaj staras inter la cedroj kaj ploras kaj mi ŝteliras ĝis la orleonoj ĉe la pordego kaj vidis, kiel ŝi estas kun la alia kaj en la stelhalo, kie la arkajoj estas plenaj de artefaritaj lunoj, ŝi faras malbonaĵojn kun la alia kaj mi mansignas kaj ĉiuj steloj falas teren kaj detruas la kastelon je pecoj, kiuj sible kaj sure fajras.

Reĝo Salomono viŝis la ŝviton de sia

frunto kaj rigardis, kiel mi leviĝis kaj faligis dek oerojn en lian drapĉapon. Poste li daŭrigis, dum li forigadis sin al la pordo.

— KREDU, ke mi ne estis tiel diabla, kvankam mi batis ŝin, ŝi ja federaciis kun la diablo, ŝi donis miajn donacojn al etiopo, kiu ne adoras ununuran dion kaj kiu ne havas kompaton, sed dum mi sola iradas en la noktoj, en la arbaro, mi pensas: — Tamen kiel bela kaj kara vi estis, reĝino de Saba, he-ne.

Li elpaŝis dorse al ia mailumo, kiu gapadis post li kaj malaperis kun ia bleksimila kantado. Kaj mi pensis, ke mi komprenis tion pri la reĝino de Saba.

El la sveda: *F. Szilágyi.*



Esperanto inter kripluloj.

La blinduloj estas pli klarvidaj ol multaj ordinaraj homoj, ĉar jam de longe ili akceptas esperanton kiel ilon, per kiu ili povas venki multajn malfacilaĵojn en sia vivo. Kial ne la kripluloj faru same?

En la kriplulejo de Hälsingborg oni kelkfoje aranĝis esperantokursojn, kaj ĉi tiun vintron ankaŭ la kriplulejo de Göteborg estas »infektita» de esperanto. Tri esperantistoj ĉi tie ĉiam interbabilas esperante kaj tio interesis la lernantojn de la metilernejo tiel ke ili demandis, ĉu ni ne aranĝu kurson. Post kiam la estrino bonvole metis ejon kaj skribmaterialon je nia dispono, kurso komenciĝis, kiun partoprenas 35 knaboj. Ĝin gvidas Gustav Persson helpe de Elmer Karlsson kaj John Johansson. La intereso kaj progreso estas grandaj. La lernitajn vortojn jam post dekhora instruado la kursanoj uzas en la ĉiutaga vivo. Sed ili estas riĉaj je intereso kaj malriĉaj je mono kaj pro tio ne povas akiri librojn. Tial, se iu havas librojn, kiuj ne plu estas bezonataj, bonvolu sendi ilin al ni, por ke ili riĉigu la bibliotekon aŭ estu disdonataj al la kursanoj kaj al scivolaj kripluloj en la tuta lando! Petoj pri prunto de libroj jam venis. Tiajn librojn sendu al kontoristo Gustav Persson, Vanförestalten, Göteborg, kiu volonte respondos ev. demandojn pri la afero. Se vi konas kriplulon, kiun interesas esperanto, helpu lin en lia studado! Per tiu vi faras grandan bonon.

La triopo.



Jarkunveno de Uplanda distrikto de SEF 24.3.34.

Distriktaj kunvenoj.

LA UPLANDA DISTRIKTO DE SEF jarkunvenis la 24.3. en restoracio Phoenix en Uppsala. La kunvenon ĉeestis pli ol 60 esperantistoj kaj kiel honora gasto estis invitata la sekretario de SEF, s-ro E. Malmgren. Dum la pasinta jaro pli ol 400 personoj studis esperanton en Uplando (300 dum 1932). Dum la jaro aliĝis al la distrikto novfondita klubo en Vattholma. Komencaj kursoj dum la jaro estis aranĝataj en proksimume 20 lokoj. La estraro nun estas la jena: Prez. A. Palm, Uppsala, vicprez. H. Andersson, Enköping, sekr. S. Lindborg, Uppsala, vicsekr. P. Fredlund, Örbyhus, kaj kaskisto Ernst Eriksson, Uppsala.

Post la laborkunsido sekvis amuza kunestado. Unue s-ro Malmgren parolis pri vojaĝo, kiun li pasintsomere faris al Moskvo. La parolado estis ilustrata per lumbildoj. Post supeo sekvis teatraĵo, kiun ludis anoj de la teatra rondo en la esperantosocieto de Uppsala. Poste sekvis danco. *APm.*

LA DISTRIKTO SÖDERMANLAND—ÖREBRO—VÄSTMANLAND jarkunvenis 24.3. en popola domo de Örebro. Ĉeestis geklubanoj el Katrineholm, Eskilstuna, Kvikksund, Skogstorp, Arboga kaj Örebro. La estraro estas: Adolf Herlin, prez.; f-ino Rut Hallgren, sekr.; s-ro G. Björk, Örebro, kas.; Rickard Sund, Eskilstuna, kaj O. Eliasson, Örebro.

Sveda vespero en Warszawa.

La 22-an de marto 1934 en salonoj de Pola Touring-Klubo, Warszawa, str. Kredytowa 5, okazis granda sveda vespero sub protektorado de sveda ministro en Warszawa, s-ro Einar Hennings. La vesperon aranĝis esperanta sekcio de Pola Touring-Klubo okaze de la 26-a Universala Kongreso de Esperanto en Stockholm. La iniciativo kaj la ĉefa parto de laboro en aranĝado de la vespero apartenas al nia fervora kaj energia samideanino f-ino Halina Weinstein, sekretariino de la esperanta sekcio.

La vesperon partoprenis multaj anoj de Sveda Legacio en Warszawa, reprezentantoj de Pol-Sveda Societo, de Studenta Rondo de Svedlando-Amikoj ĉe Studenta Asocio de Internacia Alproksimiĝo »Liga«, de Pol-Sveda komerca Ĉambro kaj de sveda kolonio en Warszawa, kelkaj polaj altranguloj kaj multa, ĉirkaŭ tricentnombra, ĉeestantaro.

La granda salono estis dekoraciita per sveda, pola kaj esperanta flagoj. Malfermis la vesperon la estinta pola minist-

La kutiman feston ĉe Lappe aranĝos la 15-an de Julio la estraro.

Post la kunveno estis aranĝita bonega festeno. La programo estis riĉenhava kun kantado, muziko kaj dialogoj. Laste oni dancis. *G-son..*

ro de eksterlandaj aferoj, senatano August Zaleski. En sia tre interesa parolo li evidentigis la signifon de Esperanto por Polujo dum antaŭmilita periodo de pola politika mallibereco. Poste parolis d-ro Wilhelm Róbin, prezidanto de la esperanta sekcio. Ekparolis poste la sekretario de la sveda legacio, s-ro Eric von Post, ĝojante, ke la 26-a Kongreso okazos en Stockholm, kiu akceptos tutkore kaj inde eksterlandajn gastojn. En la nomo de Studenta Rondo de Svedlando-Amikoj tre interese kaj rave parolis la ĉarma f-ino Harmsene-Stürtz. Ŝi deklaris la pretecon de la Studenta Rondo partopreni la laboron de la esperanta sekcio sur kampo de reciproka alproksimigo de sveda kaj pola socioj, substrekante tre gravan por tio valoron de Esperanto. Poste sekvis interesa prelego de s-ro konsilanto Bronislaw Bohdan Wyszynski pri Svedlando kaj ĝia ĉefurbo — Stockholm. Kelkajn vortojn pri internaciaj esperantaj kongresoj diris al la publiko s-ro Juljan Jarecki, d-ro Róbin sciigis pri la ĝisnunaj rezultoj de la vespero: en sveda urbo Visby estas aranĝota pola vespero kaj estona Touring-Klubo en Tallinn estas preta okazigi polan turisman ekspozicion. — Kaj la unua parto de la programo finita.

Dua koncerta parto konsistis el belaj pianludoj de s-ro Aleksander Hurwicz, el tre belaj kantoj de s-ro Wyszynski («Sverige» svedlingve, svedaj popolkantoj esperantlingve), el esperantlingvaj recitaĵoj de S-ro Jarecki (Fröding — Priarta teorio, Nikander — Ondoĵ), kaj fine el karakterizaj kaj tre malfacilaj plastikaj kaj popolaj soldancoj, majstre kaj talenteplenigitaj de altarta dancistino F-ino Paula Nirenska.

La gastoj kun intereso vizitis la belan turisman ekspozicion pri Svedlando, Estonujo kaj Finnlando.

La Sveda Vespero estis plena da impresoj kaj postlasis neforgeseblajn rememorojn kaj dankon al ĝiaj organizintoj. Pola Touring-Klubo kaj ĝia Esperanta Sekcio meritas tutplenan gratulon kaŭze de la granda kaj belega vespero. Aliaj societoj kaj asocioj havas bonan kaj sekvindan ekzemplon de vere laŭdinda laboro.

B. S.



Krucvortenigmon kun libropremioj ni havas en tiu ĉi numero. Vidu paĝo 3 de la kovrilo!

GRAMMATIKSPALTEN

Ur den nyligen hos Förlagsföreningen Esperanto utkomna boken »Lingva Kvaronhoro» av Paul Nylén (Serien Sv. Esp.-Förb:s Handböcker n:r 3) ha vi tillåtit oss återgiva följande kapitel.

»SKULLE».

Vad heter »han skulle» på esperanto?

Ja, det beror på sammanhanget — det finns många sorters »skulle».

Det ena »skulle» uttrycker verklighet — »han snavade, när han skulle stiga upp i vagnen»; det andra överklighet: »om jag vore stormrik, skulle jag skänka dig en miljon». Ett annat »skulle» är ett rent futurum (ett »skall») flyttat i den förflutna tidens sammanhang: han sade, att han skulle komma i morgon. (Hans yttrande var: »jag skall komma i morgon».)

Den första meningen kunna vi återge exempelvis så: li faletis, kiam li volis surpaŝi en la vagonon.

Den andra, som är ett typiskt antagande, vilket strider mot verkligheten, fordrar ändelsen *-us* i såväl om-satsen som dess följsats: se mi *estus* riĉega, mi *donacus* al vi unu milionon.

Den tredje meningens »skulle» anför i indirekt form ett yttrande, och regeln är i esperanto, att den indirekta anföringen får bibehålla samma verbform som stod i det ursprungliga direkta yttrandet. »Han sade, att han skulle komma i morgon» heter alltså: li diris, ke li *venos morgaŭ*.

»Hur skulle du bära dig åt, om du skulle möta en björn i skogen?» — Här är också en villkorssats, men antagandet innehåller ingen orimlighet — saken kan mycket väl tänkas inträffa — även i sådana fall användes *-us*: Kiel vi *agus* eller: Kion vi *farus*, se vi *renkontus* urson en la arbaro?

»Hon mötte sin far, när hon skulle gå till posten» — ordagrant: »ŝi *renkontis* sian patron, kiam ŝi *estis* ironta al la poŝtejo. Bättre dock: Ironte al la poŝtejo, ŝi *renkontis* sian patron, eller också: Survoje al la

»Skulle ni möjligen vilja upplysa mig vad klockan är?» Ĉu vi *bonvolus* min informi — eller sciigi al mi —, kioma horo estas? Eller (lika bra direkt uppma-

ning): Bonvolu sciigi min, kioma horo estas.

»Hon var munter och glad, som om det inte skulle funnits någon fara»: ŝi estis gaja kvazaŭ ne ekzistus danĝero.

För att uttrycka en hövlig framställning eller fråga använda vi ofta »skulle». T. ex. »Skulle ni vilja bjuda mig brödet» = Ĉu vi prezentus al mi la panon. »Jag skulle vilja veta, om ni fått mitt brev» = Mi volus scii, ĉu vi ricevis mian leteron. Jag skulle vilja (önska) köpa ett par handskar = Mi dezirus aĉeti paron da gantoj — i ett sådant fall som detta är det dock bättre att säga »mi deziras». I de båda föregående meningarna skulle det emellertid låta för bryskt, rent av ohövlighet att säga -as. »Mi volas scii, ĉu vi ricevis» verkar ju rent av förhörston.

Ibland använda vi ett *skulle* i ett tveksamt påstående, i en tvivlande fråga eller förmodan, såsom exempelvis: Man skulle tro, att han vore sjuk — oni opinius, ke li estas malsana.

Men i många fall är det bättre att återge ett dylikt »skulle» så som framgår av följande exempel:

»Ingen skulle för visso beklaga det» — certe neni bedaŭras (eller bedaŭros) tion. »Skulle han verkligen vara sårad» = ĉu li vere estas vundita?

Nu skulle vi vara framme då! = Nun ni atingis la celon!

Ytterligare exempel!

Han fruktade, att portmonnän inte skulle återfinnas: *Li timis, ke la monujo ne estos retrovata*. Han sade, att jag skulle gå min väg: *li diris, ke mi foriru*. De visste inte, om de skulle gå genast: *ili ne sciis, ĉu ili iru tuj*.

Vi se av vad som här sagts, att det svenska verbet »skulle» har en mångsidig användning och måste återges olika allt efter sammanhanget.



U.E.A:s årsbok.

På grund av allt arbete i samband med omorganisationen utkommer årsboken först i maj eller juni. Vi be om överseende med dröjsmålet och hoppas att årsboken, när den väl kommit ut, blir desto mer välkommen. — Om någon av dem, som i egenskap av s. k. »frupaganto» av U.E.A:s årsbok ej redan erhållit premiebok, så var god meddela S.E.F:s sekretariat.

★

De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

Antaŭ ĉio la kompilanto de la subaj citaĵoj denove fiksas sian vidpunkton. Nia gazeto ne deziras sekvi la ekzemplon de kelkaj niaj kolegoj, kiuj sub similkaraktera rubriko starigas publikan laŭdejon aŭ batejon. Ni volas nur objektive konigi la interesajojn de la Esperanta gazetaro, do neni povas atendi de ni laŭdojn aŭ punmakulojn. Ni nur konigas, do ni eĉ tiam ne estas por iu, aŭ por alia vidpunkto en tiu ĉi kadro, se ni private havas iun konkretan opinion pri io. Kaj se ni skribis foje pri konkreta batal-temo de Esperantujo, ke ni konigos okaze la *alian* opinion — kiel okazis pri la temo: neologismo, tio povas signifi, *nur* ke ni konigos ambaŭ opiniojn, *nenion plu*. Mi tre ĝojas, ke letero de tre estimata eminentulo donis okazon al mi ripeti tiujn principojn, kiuj gvidas min, kompilante la interesajojn de nia gazetaro.

HEROLDO DE ESPERANTO: en la 10-a numero dir. Karl Wannek proponas la unuecigon de la ĉefaj Esperanto-organoj sub la nomo *Esperanto Heroldo* kaj deziras, ke la Stokholma kongreso »nepre alportu ĉi tiun necesan perfektegon de la unuecigita movado». Nur unu oficialan organon! — diras J. Baghy en la sama numero. Ni trovas viglan enketon pri kaj post la artikolo de Price-Heywood — ĉu Esperanto estas ludo, aŭ kulturfaktoro; (li ja riproĉas kelkajn tendencojn en la movado, kiuj ne direktas la movadon en seriozan direkton). El la eĥo de tiu artikolo ni citas frazojn: »Jam estas tempo forigi, absolute forigi ĉian amatorecon el nia movado.» (J. Hartog). AKK skribas en la sama senco, konstatinte, ke ekzistas iu danĝera maniero, kiu pelas la movadon en la larĝon, forlasante la penon al la profundo. En la 12-a numero ni trovis alvokon de TAGE (Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj, Nassauplein 15-a, Groningen, Nederlando) por sendi raporton pri eventuale okazinta tendaro de junuloj dum libertempo, pri la nombro, sekso, aĝo, lernejo de la infanoj, pri la helpo de Esperanto, antaŭa studado de la lingvo, tagordo de la tendaro ktp. Tiuj datoj estas tre gravaj por farota raporto de la internacia fak-kongreso.

Bonhumora eraro glitis en la martan numeron de iu grava gazeto, kie ni legis, sub stokholma bildo: Renoj en muzeo Skansen. Sed sur la bildo ne estis anatomiaĵoj, sed boacoj. Tiu »mis-eto» inde kompletigos la Esperantan Prezeraran Muzeon, kie mi gardas kelkajn tre serenigajn ekzemplerojn, ekzemple »akvokato» anstataŭ *advokato* ktp.

ESPERANTO (Genève) en la marta numero aperigas la jenan artikoleon: *Esperanto kiel edziĝoperilo*. — Jes! Esperanto ree donis evidentan kaj belan pruvon pri sia utilo.

Tiun ĉi fojon en 's-Hertogenbosch (Nederlando).

Antaŭ kelka tempo du geamantoj volis pasi en la edziĝosipeton. Sed la ŝipestro ne permesis al ili! Ĉar la patro de l' neplenaĝa fianĉino estis netrovebla! Jam antaŭ longe li elmigris al Ameriko.

Kion fari!

La paro turnis sin al la helpoficejo de urba instituto: tiu ĉi turnis sin siaflanke al s-ro Hoen, UEA-Delegito de 's-Hertogenbosch.

Kaj tiam la afero trovis solvon. — —

Per la dokumentoj akiritaj de la UEA-Delegitoj de Minneapolis kaj 's-Hertogenbosch, la atendantaj geamantoj fine povis geedziĝi.

El la dua numero de *LITERATURA MONDO* ni citas nur unu frazon el la tre interesa artikolo de Albert Einstein (Kial la civilizacio ne bankrotos): »Mi estas optimisto. Mi asertas la vivon. Ĉar kiu ajn estu la sorto de sunoj kaj universoj dissolvigantaj, ekzistas tio, kion ni nomas progreso Mi estas optimisto malgraŭ la malvigleco, malsatego, malkontento kaj renaskiĝo de militemo, — la Kvar Rajdistoj de l' Nova Apokalipso en sanga sekvo de l' Mondmilito»

NIA GAZETO (marta numero) sub la rubriko — *Scienca Kroniko* — informas inter aliaj pri tio, ke pluraj japanaj sciencaj revuoj donas esp. artikolojn, aŭ resumojn kaj ekz. la Ljubljana Meteorologia Instituto (Jugosl.) eldonis esperantobroŝuron de d-ro Reya Oskar, ktp. El alia artikolo ni citas partojn: I.A.L.A. (International Auxiliary Language Association) dissendis antaŭ nelonge dikan, kelkpaĝan programon, per kiu ĝi invitas al renoviĝanta komedio: al kreo de delegacio por studo kaj difino de »defini-

tiva formo» de lingvo internacia. Al tiuj ĝentilaj proponoj la esperantistoj respondas *ne*. Esperanto estas vivanta lingvo, kaj neniu havas rajton eksperimenti sur nia viva korpo.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (Redaktejo, Engelsche laan 30, Winschoten, Nederlando, administracio, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando): Al la franca koresponda kurso, aŭ al parolkursoj de Franca Esp. O. aliĝis pli ol 500 geinstruistoj.

VEGETARANO: (Jan.-febr.) Red. J. L. Saxon, kiu fondis la vegetaran movadon en Svedujo, Norvegujo kaj Finnlando fariĝis 75-jara. (Gratulon!)

SENNACIULO petas helpon por la vidvinoj kaj orfoj de la aŭstraj bataloj.

En la marta numero de *SENNACI-ECA REVUO* ni trovas tradukon de sveda novelo (Pelle Molin: Rondodanco). La pseudonimo de la tradukinto estas tiel ne deca, ke ni ne kuraĝas citi. Ni malkaŝas nur tiom, ke ĝi komencas per F kaj finiĝas per la silabo: -zo. Kiu ŝatas la »porkaĵojn» cerbumu pri lia nomo kaj pri tio, ĉu la tradukinto ne trovis pli belsonan pseŭdonimon?

El la naciaj gazetoj unue ni citas la vortojn de *BELGA ESPERANTISTO* pri la granda mortinto de la belga Esperantistaro — *Frans Schoofs*, kiu mortis en sia 46-jara aĝo:.... »Kaj nun tiom da multjara sindonemo al alta Idealo, tiom da laboremo post nur kvartaga mortiga malsano haltis kaj eksilentadis en eterna ripozo! Ni, kun koro vundita kaj danke plorante, profunde kliniĝas antaŭ tiu bela vivo, kies fadenon tro frue tranĉis la senkompata Parkino.» (Ni mem ankaŭ ekveis, kiam ni sciigis pri la nova perdo de nia movado kaj kun granda dankemo rememoras la meritplenan vivon de Frans Schoofs.)

El *AŬSTRIA ESPERANTISTO* (marto) ni citas la jenan alvokon: »Sendu al ni materialon pri botaniko, skribu pri biologio kaj botaniko. Peradu ankaŭ la aperigon de sciencaj artikoloj en landaj fakgazetoj. Por granda kolekto de gazetraportoj el la faka sfero transdonu aŭ sendu al la komitato ĉiun uzeblan. Valoraj estos rekompencataj laŭdezi-re! S-ro F. Berger, Wien III, Kölbasse 10, al kiu direktu ĉion, disponigos al vi originalaĵojn por raportado sub kondiĉo, ke vi siatempe transigos gazetteltranĉaĵojn

al li.» En la sama numero ni trovas alvokon al la anoj de la likvidota laborista societo aliĝi al la AEA por kunlaboro: »ne plu ekzistas *burga* aŭ *laborista* esp-isto, sed simple »esperantistoj-samideanoj»

BULGARA ESPERANTISTO: »Nia blinda hungara samideano *Imre Ungár* donis du koncertojn en Sofia kaj rikoltis nesongitajn laŭrojn, estante sesfoje bisita.» *Fersil.*

Tre estimata s-ano Grenkamp-Kornfeld!

Kun granda intereso mi legis la ĝisnunajn numerojn de via nova gazeto kaj kiel aliloke mi pruvis per mia recenzo, la revuo vere plaĉis al mi kaj mia esperantista koro havis plezuron legante la unuan numeron, tiel, ke mi tuj enlitterigis mian simpation. — La dua numero donis al mi iom da acidajo, sed mi ne povas diri, ke la honoriga mencio de mia modesta nomo tro surprizis min. Tion ja povas pruvi kelkaj miaj geamikoj, al kiuj mi precize antaŭdiris tion. — Neniuokaze mi volas devojiĝi al la direkto de la malobjektiveco kaj eventualaj malmultekostaj spritaĵoj, kaj nur tial mi respondas publike, ĉar temas pri lingvaĵoj.

Sub la rubriko »Tra la Gazetaro» mi vidis multajn laŭdvortojn pri redaktoro Eriksson, kiu pere de mi kore vin dankas pro via afableco kaj samloke mi trovis riproĉojn kontraŭ »eraroj de la profesoro». Tiu profesoro mi estas, sed la eraroj ja ne estas miaj. Mi ja foje uzis ie, en recenzo la esprimon »definitiva artikolo» kaj via anonima recenzisto — *espereble ne vi estis* — bonvolis nomi tiun esprimon »monstro», kiu ne troviĝas en la tuta gramatiko kaj estas dankeble nur al la akra saĝo de la koncerna recenzisto, ke li povis kompreni tiun vortomonstron. Poste mi rimarkigis, ke »unu» ne povas esti artikolo, ĉar la *Fundamento ne permesas tion*; kaj la tre estimata »artikolisto» kontraŭopinias, dirante, ke mem Zamenhof uzis tiel la menciitan vorton. La afabla recenzisto proponas al mi legi la »Fabelojn» de Andersen-Zamenhof, por konvinkiĝi pri lia pravo.

Se vi ne kontraŭdiras, mi komencas ĉe la fino. Dankon pro la afabla konsilo, sed mi ja legis la librojn de Zamenhof, — ankaŭ miajn librojn, eĉ la librojn de miaj redakciaj kolegoj. Mi ne povas diri la saman pri la anonima »artikolisto»,

kiu certe ne legis la klarigon pri la vorto definitiva en la »Plena Vortaro», kies verkinto estis inter aliaj, s-ro S. Grenkamp-Kornfeld. Tie oni povas legi: *Definitiva* decida, finofara ktp. Mi ne volas nun aludi pri la vortaroj francaj, anglaj ktp kaj pri la internacia signifo de la vorto, mi nur bedaŭre konstatas, ke la afabla artikolisto nomas monstro — senkulpan, oficialan vorton, nur pro tio, ĉar mi ne uzis la pli kutiman esprimon. Tion mi ja faris konscie, pensante pri la grandnombraj komencantaj legantoj, kiuj pli facile rekonas la pli internacian vorton »definitiva», ol difina. Via artikolisto ne estas bona knabo kaj ne tre komprenema. Vi ja ne rajtas tro malsimpligi la aferojn.

La dua afero: Zamenhof vere uzis unu kelkfoje, kiel artikolon (pri tiu Zamenhofa uzado mi foje skribis jam), kaj se li faris tion, li mem eraris; kompreneble tio ne estis neeblaĵo, ĉar Zamenhof estis homo kaj certe ankaŭ vi scias, ke estis ekzemplo pri tio, ke samepokano atentigis lin pri *lia* fundamento. Tio ne-niom tuŝas la grandecon de nia Majstro, kies genio brilos eĉ tiam, se oni ne klopodos kun lia nomo, kun la idoligo de lia, ĉiam modesta persono legitimi kaj enkonduki kontraŭfundamentajn formojn.

Kaj nun mi finas mian leteron, dezirante al vi kaj al via gazeto grandajn sukcesojn kaj kun miaj samideanaj salutoj bonvolu akcepti miajn korajn gratulojn pro via bonega redaktora agado, kiun objekte oni povas nur laŭdi; nian nunan disputeton mi emas rigardi nur bagatelo.

Stockholm, Paskon 1934.

D-ro Ferenc Szilágyi.

— ★ —

Till våra läsare!

Många önskemål beträffande vår tidnings innehåll ha under årens lopp framställts. Detta är alltid intressant, och för dagen skulle vi vilja till våra läsare framställa dessa frågor:

Vad tycker ni om av vad som hittills bjudits?

Anser ni något kunna strykas?

Vad önskar ni ytterligare?

Vi äro synnerligen tacksamma om våra läsare ville skriftligen delge oss sin uppfattning i berörda avseende. *Red.*

Internationell konferens

för esperanto i praktiska livet
och i skolan.

Wien 19—24 maj 1934.

Universala Esperanto Asocio har sedan flera år som ledstjärna för sin verksamhet haft esperantos praktiska utnyttjande. För att nå sitt mål har UEA bl. a. anordnat kongresser, dit icke-esperantister i framskjutna ställningar inom handel och vetenskap, kommunikationsväsendet o.s.v. inbjudits för att genom egna erfarenheter kunna bedöma esperantos användbarhet. En ny sådan internationell konferens kommer nu att äga rum i Wien den 19—24 maj 1934. Konferensens motto skulle kunna sägas vara: »Fram för esperanto i skolan och livet!» Beskyddare blir Österrikes president Wilhelm Miklas, och hedersordf. är kanslern, dr Engelbert Dollfuss. Handelsministeriet har ställt de nödvändiga penningmedlem till förfogande. Följande grupper av enskilda och institutioner ha inbjudits: handelskammare, varumässor, handelsskolor, ekonomiska föreningar av alla slag, särskilt järnvägsbolag, sjöfarts- och luftfartsbolag samt trafikbolag av annat slag, universitet och högskolor, lärarföreningar, filmbolag och bildningsförbund. Man är redan försäkrad om deltagande från en del regeringars sida.

Några av de punkter, som kommer att behandlas, må anföras: Esperanto som första främmande språk och grundval för studiet av andra främmande språk. E. som code-språk och korrespondensspråk. E. som internationellt hjälpspråk. E. som enda översättningsspråk på internationella kongresser. E. som direkt underhandlingsspråk. Förslag om införande av E. i olika slags skolor. Förslag om användande av E. inom handel, samfärdsel, vetenskap etc.

Förslag och rapporter till konferensen kunna avfattas på varje språk. Översättning sker till endast esperanto. Vid de esperantoutsändningar, som varje onsdagsafton äger rum från Wien, meddelas då anledning föreligger om de vidare förarbetena för konferensen.



Redan över 1000 deltagare

i sommarens kongress! Denna storartade siffra borgar för en jättekongress. Har *Du* anmält dig?

LIBROJ KAJ GAZETOJ

NOVAJ GAZETOJ: 1) NIA GAZETO, monata eldono de »L' éclairer de Nice et du Sud-Est». Ĉefredaktoro S. Grenkamp-Kornfeld. Abonprezo: fr. frcs 12:—.

Mem la fakto, ke la grava franca gazeto entreprenas la eldonon, estas altetaksinda el nia vidpunkto kaj krome la listo de la ĉefkunlaborantoj certigas gravecon al la nova revuo, kies unuan numeron tre lerte redaktis S. Grenkamp-Kornfeld. La gazeto promesas sendependecon kaj vivantecon kaj se la sekvaj numeroj similos al la unua, ni ne devos plendi pro la neplenumo de la promesoj. La unua numero estas vere varia, interesa, alloga. El la intervjuo, farita kun Herriot, ni citas parteton, kiu klarigas pri la favoro de la granda franca politikisto al nia afero: »... Cetere mi ja scias la servojn jam faritajn de Esp. ... Vi sendube memoras pri la deziresprimo, kiun sub mia prezido la urbkonsilantaro de Lyon unuanime voĉdonis favore al la enkonduko de Esp. en la lernejojn de la tuta mondo.» Krome ni citas la nomojn de la diversaj rubrikoj, kaj artikoloj: Kulturo (G. Kornfeld), Nekrologoj pri Grosjean-Maupin kaj Felikso Zamenhof, — Mia angulo (J. Baghy), En la nova jaro (L. Zamenhof), En Estonio (Kaden Bandrovski), Malnovaj folioj (praliteraturaĵo de Esp.), Esperanto en ekzilo (Lejzerovicz), Lingvaj problemoj (Collinson), Enciklopedia Vortaro de Wüster (Glück), Lingva Konsilanto, Aventuroj de la vivo (Leontin) ktp. ktp. Konstantaj rubrikoj kompletigas la sukcese promesan gazeton.

2) LA KRITIKA OBSERVANTO (Revuo Politika kaj Kultura). Redakcio kaj Admin. 6 Sentier de la Sablonnière, Malakoff (Seine) Francujo. Aperas kvaronjare. Jarabono: unu sveda krono.

La programo de la revuo: utiligi sin por la progreso de la tutmonda laborista movado per la lojala kaj objektiva kritiko pri la bazoj kaj taktikoj de la divers-tendencaj laboristaj organizoj; elmontri la principojn de racia politiko kaj sendogme ekzameni la faktojn, kiujn konigas al ni la historio.» La enhavo de la nun sendita dua numero estas riĉa kaj interesa. La mondpercepto de la revuo estas socialista. *F. Szilágyi.*

IVANS: La viro el Francujo. (El nederlanda lingvo tradukis W. Versteeg. Graftdijk. 242 p. Eld. Populara Esp. Biblioteko, Amsterdam; prezo: 6 sv. kr.)

Interesa detektivromano, jes interesa, sed iom post la komenco ni konstatas, ke la verkisto tro abundigas la romanon per interesaj premisoj tiel, ke ni laciĝas. La bele presita kaj plaĉa libro estas »kontrolita kaj rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio». Malgraŭ tio ni trovis kelke da riproĉendaĵoj. Ekz. Kaprompiga, anstataŭ kaprompa, spite sia kutimo (spite de . . . , aŭ spite sian kutimon). Ni preferas la vorton proksimo anst. proksimeco. La neologismo »darfas» ne estas tre simpatia. — Aliloke ni legis: Li portas unu manon en tukon, kiu esprimo vekas en ni teruran bildon pri kruela murdo, sed la verkisto volis nur diri, ke li portis tukon sur unu el siaj manoj; kaj ni trovis en la, cetere, flua kaj bona traduko kelke da aliaj malprecizajoj. *F. Szilágyi.*

J. BAGHY: Verdaj Donkiĉotoj. (Eld. A. Szalay, Budapest; 221 p. Prezo 2 sv. fr.)

La nova libro de J. Baghy konsistas el du partoj. En la dua parto ni trovas liajn karikaturojn pri la »rondo familia», en kiuj akrevide, kun amara satiro li desegnas la groteskaĵojn de la esperanta vivo.

La unua parto estas originala romano kaj tre atendinda verko de la eminenta verkisto. Temas pri kamparana junulo, kiu en sanatorio konatiĝas kun homoj kaj problemoj, pri kiuj li sciis nenion kaj blinda knabino konatigas al li Esperanton. Li ekiras sur la vojo de la aŭto-didaktoj kaj post diversaj periodoj de sia Esperantismo li nun daŭrigas la vojon de la vojserĉantoj. — Bedaŭrinde la loko mankas pli detale pritrakti la romanon, kiu karakterize montras la verkistajn virtojn de Baghy, la riĉan, rakonteman fantazion, la inklinon al la groteskaĵoj kaj samtempe al la idealigo, kiu ĉiam kredigas al ni, kion la verkisto volas kredigi kaj tio estas la plej granda arto. Rilate al la aliaj verkoj de Baghy la nuna verko ŝajnas esti iom pli kontura, pli larĝe pentranta. Certe la verkisto intence uzas tiun ĉi manieron de la tekniko, sed en kelkaj partoj mi forte sentis deziron: legi pli detale pri la koncernaĵo en la alloga, bela lingvo kaj svingiĝi plu kaj pli longe. Ĉiuokaze ĝoje ni envicigis en nian bibliotekon la ver-

kon de la eminenta verkisto, pri kio ni raportus pli detale, se ni havus sufiĉe da loko. *F. Szilágyi.*

MONTAGU C. BUTLER: Step by step in Esperanto. (Eld. Brita E. Soc. Prezo: 1 ŝ. 6 p.) La nova, tute reverkita eldono de la bonega angla gramatiko prezentas valoran gvidilon speciale al tiuj, kiuj jam finis mallongan kurson kaj volas pliprofundigi siajn supraĵajn konojn. Speciale ni rimarkis, ke pli multaj legaĵoj estas en tiu ĉi eldono, ol estis en la antaŭa, kies sola manko estis la troa mozaikeco. Tre rekomendinda verko. *F. Szilágyi.*

STURMER: Facila Legolibro (Eld. The Esp. Publishing Co. Ltd. Prezo: unu ŝil. angla.). La libreto konsistas el la enhavkonigo de kelkaj esp. romanoj, du poemoj de Zamenhof kaj mallonga traktato de Johnson pri la Esp. literaturo. Ĉi lasta ŝajnas esti tro mallonga kaj konciza por tio, ke oni povu ricevi certan gvidilon en la literaturo. Mankas nomoj (ekz. Mihalski) kaj literaturaj tendencoj. Cetero la legolibron karakterizas modela redaktado kaj simpla, lerta stilo.

F. Szilágyi.

P. NYSSSENS: Bonhumoro (Eld. la aŭtoro, Bruxelles; 173 p.)

»Neniam — laŭ mia opinio — verko estis pli aktuala, ol tiu ĉi libro, kiu intencas instrui al ni esti optimistaj, bonhumoraj malgraŭ ĉio. »Bonhumoro varmigas la koron kaj lumigas la vizaĝon; nek la malhelaj nuboj, . . . nek la glacia vento ĝin aliecigi. Bonhumoro havas bonfaran influon en korpo, kiel en cerbo; ĝi plivastigas spiradon, reguligas sango-rondiradon, faciligas digeston, plibonigas nutradon . . .» diras inter aliaj la aŭtoro, kiu proprigas pli grandan influon al la korpo de la memdisciplino, ol renverse. La teorio estas tre simpatia, speciale al ni, kiuj *oficiale* fiksas nin al la teorio de la optimismo, sed certe tiu teorio havas limojn en la konkretaĵoj. Ankaŭ tiun libron estas iomete malfacile konigi en kelkaj vortoj kaj ni devas kontentiĝi per la deklaro, ke la tendenco, enhavo kaj principoj estas ege simpatiaj kaj la leganto povas havi nur utilon, moralan plibonigon de la libro. — La stilo de la libro estas laŭdinda, tamen estas kelke da kunmetaĵoj, kiuj klopodas al troa precizeco, donas iom da nenatura impresoj al la frazoj kelkloke. Ekz. »humordifektŝanĝo», aŭ ekaperas, (kie la prefikso estas

superflua). Mi devas ankaŭ laŭte tamburi kontraŭ la trouzado de la prepozicio »je», kies terenon oni ne plivastigu, sed male.
F. Szilágyi.

I. CANKAR: *Servulrajto* (trad. d-ro J. Stefančić. Eld. La Suda Stelo Slav. Brod (Jugoslavujo) Prezo: 2 sv. fr.). Slovena ĉefverko — rapide ni konstata — tre bele tradukita, kiu pritraktas la praan problemon de la interrilato inter servisto kaj mastro, kaj en rule fluaj versoj la aŭtoro preterpasas abismojn, la plej terurajn kontraŭdirojn de la homa estado. Malgraŭ tio, ke la traduko estas tre bela, en kelkaj lokoj ni povas riproĉi troan koncizon, kiu malhelpas la komprenon. Sed ni ne serĉadu tro longe por trovi difektojn, ĉar tiam la leganto devus pensi, ke ni volas diri malbonon pri tiu ĉi bela libro. Kaj vere tio ne estas nia intenco.

F. Szilágyi.

F. AZORIN: *Univ. terminologio de la arkitekturo.* (Eld. Presejo Chulilla y Angel, Madrid, 213 p.) Tiu gravega fakverko, ilustrita de klarigaj desegnaĵoj donas plenan kolekton de arkitekturo kaj parencaj fakoj. Ankaŭ tiu verko estas tre grava gajno de nia vortarliteraturo. Kiel motivadon de la vortoj ni trovas apude la saman vorton en ses lingvoj. Rekomendinda verko ankaŭ al ne arkitektoj.

F. Szilágyi.

JACJO HOLM KAJ LIAJ AMIKOJ. Verkis W. G. van de Hulst, trad. el nederlanda H. C. van Leeuwen. Eldonejo G. F. Callenbach, Nijkerk (Nederlando) 236 paĝoj. Prezo 2,50 nederl. guld.

Historio pri petolemaj sed bonkoraj knaboj, pri malriĉa Jacjo kaj bonsituata amiko lia Kes, kiel rompiĝis la amikeco inter ili sed kiel ĝi denove firmiĝis — entute bona historio por gejunuloj, sed ankaŭ plenaĝuloj kun plezuro legas ĝin.

KURIOZA OKAZAJO. Triakta komedio de Carlo Goldon. Tradukita el la itala. 64 p. Prezo sv. fr. 1:50 ĉe Esperanto Centro Itala, Galleria Vitt. Eman. 92, Milano.

VOJAGOJ DE GULIVERO. I. AL LILIPUTLANDO. Esperantigis Jos. A. de Roos. Eldonis Eldonejo Piet Smits, Korvelsche weg 85, Tilburg, Nederlando. 112 paĝoj. Prezo 1:25 hol. guld.

Jen traduko de la malnova rakonto, kiu iam venkis la tutan mondon. Kaj mi devas diri, ke nun post 30 jaroj mi legas

ĝin kun preskaŭ sama intereso kiel en mia junaĝo. Tio certe plejparte dependas de la modela traduko. *BE n.*

SALOM ASCH: *La Sorĉistino el Kastilio.* Historia Bildo. El la juda originalo tradukis Izrael Lejzerowicz. Formato 20×13,5 cm. 148 paĝa, kun dukolora kovrilo. Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, Budapeŝt IX. Mester-u. 53. Prezo broŝ. sv. fr. 3:50, bind. sv. fr. 5:— . Aldonu 10 % por sendkostoj. Por mebroj de AELA ĝi estas la dua libro de 1933.

KOMENTOJ AL LA KOMUNISTA MANIFESTO, tradukis el la angla T. Veder, 56 p., prezo: fr. fr. 3,60. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris 20.

SLOVENIO, 12-paĝa prospekto en esperanto, eldonis oficiale fine de marto 1934 la plej grava fremdultrafika societo en Ljubljana. Ricevebla senpage ĉe »Putnik» vojaĝoficejo, Ljubljana, Tyršova c. 1, Jugoslavio. La societo, vidinte la sukceson de antaŭa prospekto, konvinkiĝis pri la praktika valoro de esperanto por fremdultrafiko. Ĝi lasis ellernian lingvon unu oficistinon pro la korespondado.

BUDAPEST FOIRO. Internaciaj Aŭtokaj Motorkonkursoj, 4—14 majo 1934. Bonega reklamo en Esperanto: grandformata afiŝo, reklama ŝildo, reklamfolio, glumarko kaj kalendaro.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

**Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm**

Undertecknad uttalar härmed ett varmt tack till alla meningsfränder, som sänt vykort. Tyvärr komma svaren att dröja något, på grund av den stora mängd kort, som kommit, men alla skola dock få svar!

Samideane


GILLIS STABERG.

Fraŭlino Ida Christenson, Skaarup, petas pri pardono ke ŝi ne povas respondi al ĉiuj, kiuj skribis al ŝi.

HORIZONTALALE:

1. Festi.
4. Brunhaŭta; individuo.
8. Detruigās.
10. Afrika dombesto.
11. Faras la terkulturisto.
12. Makuligas sorbilon.
14. Senkolora.
15. Kalkuladverbo.
16. Sekve de, konforme al.
18. Slosilparto kaj flankparto de trupo.
19. Malsuper.
22. Eŭropa ĉefurbo.
25. Romano de Upton Sinclair.
26. Faris konata Tomas.
28. Tiaj hundoj estas danĝeraj.

Krucvortenigmo N-ro 4.



(Solvo venos en la maja n-ro.)

29. Herbo.
30. Britaj regatoj.
31. Itala urbo.

VERTIKALE:

1. Konata esperanto-instruisto.
2. Arbo kun frukt-konusoj.
3. Malkonfesas.
5. Arde ŝatas.
6. Preskaŭ ne.
7. Faras la konvalo.
9. Tiom da jaroj Jakob pagis por Lea.
10. Kunligilo.
13. Multekosta ŝtono.
14. Eta birdo.
17. Vualas, kaŝas.
18. Senkulpiga pruvo.
20. Nevidpova.
23. Senprokraste.
24. Estas la asketo.
26. Germana najbaro.
27. Tremigi.

Libropremioj al la sendintoj de la 3 unue trovitaj ĝustaj solvoj. La solvojn sendu al Sveda Esperanto-Gazeto, Fako 698, Stockholm. Surskribo sur la koverto: »Krucvortenigmo N-ro 4«. Lasta dato por sendo de la solvaĵo 15an de majo.

Förlagsföreningen Esperanto u.p.a.

håller ordinarie årsmöte annandag pingst den 21 maj kl. 10 f.m. å Stadshotellet, Södertälje.

Ärenden enligt stadg. § 11.

Konfirmering av vid 1933 års möte fattat beslut om ändring av stadgarna § 4 mom. 3 och § 14.

STYRELSEN.

Korespondado.

Korespondi deziras f-ino Ella Rosenfeld, Virág-u. 9, Rákoshegy (Hungarujo).

Propagandafonden.

Motala Esperanto-klubb 1:—

TREDJE UPPLAGAN

av Frits Lindéns

Kurs i Esperanto

har nyss utkommit. Förf. har underkastat boken en grundlig omarbetning och den nya upplagan uppvisar, i jämförelse med den föregående, flera företräden.

Pris 90 öre.

Jaroslavo Haŝeh:

La travivaĵoj de la brava

Soldato Ŝvejk

dum la mondmilito.

Övers. från tjeckiska.

En satirisk berättelse riktad mot det österrikiska militärväldet i Tjeckoslovakien före och under världskriget.

152 sid. Pris kr. 3:—.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Stockholm 1.

Södertälje-esperantisterna hälsa dig välkommen i pingst!

N-ro 4 en la serio de Sveda Esperanto-Federacio estas aperinta:

Per kio ni amuzu nin?

Societ- kaj dancludoj.

De *Jakob Rosenberg* och *Ernfrid Malmgren*.

Enhavas kolekton de la plej amuzaj kaj belaj ludoj endomaj kaj liberaeraj, svedaj dancludoj kaj ĉenkantoj.

Prezo: Sv. kr. 1:— (por anoj de SEF 0,50).

La antaŭe aperintaj numeroj de la serio estas:

1. *Hur leder man fortsättningskurser i Esperanto?* De *Einar Dahl*.
2. *La Esperanto-Klubo. Kial fondi ĝin — Kiel organizi ĝin — Kiaj estu la programoj?* De *Ernfrid Malmgren*. (En Esperanto.)
3. *»Lingva kvaronhoro»*. De *P. Nylén*. (En sveda.)

Från norskan

har översatts Björnstjerne Björnsons kända och högt uppskattade »En glad gutt», som utgivits under titeln

GAJA KNABO

93 sid. *Pris kr. 1:50.*

Från polskan

har Lidja Zamenhof översatt H. Sienkiewicz världsberömda roman

QUO VADIS?

Två delar Inb. i svart klotband. *Pris för båda delarna kr. 12:—.*

Naciaj kostumoj Svedlandaj

Ĉar ni multfoje ricevis demandojn pri poŝtkartoj kun bildoj de niaj belaj naciaj kostumoj, ni faris elekton de la plej belaj kartoj tiaspecaj nuntempe haveblaj. Ili estas litografie presitaj en belaj koloroj. Adresflanko kun esperanta teksto.

Prezo: Serio da 10 diversaj kartoj sv. kr. 1:50; 1 karto 0:20.

Jo-Jo är glömt,

Lexicon

är namnet på den nyaste »flugan», som först uppstod i England och sedan dragit över flera länder som en stormvind. »Lexicon» är ett roande sällskapsspel. Det har nu utkommit i esperantoupplaga (det finns ännu icke på svenska!).

Pris pr spel kr. 3:—.

Eldona Societo Esperanto,

Poŝta fako 698. STOCKHOLM 1. Poŝtĉeka konto: Stockholm 578.